

Nagata H. (2004). Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: Negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.

Nagata H. (2006). Judgments of grammaticality of Japanese simple sentences involving two arguments in a whole-part relation: A further examination of Chomsky's principle of full interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 102, 855-870.

Nagata H. (2007). Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj. *Scienca Revuo*, 58, 99-110.

Nagata H. (2009a). Ĉu la realista starpunkto ekzistis ekde la komenco en la genera gramatiko de Chomsky? *Scienca Revuo*, 60, 95-104.

Nagata H. (2009b). Chomsky's derivation-by-phase theory as applied to judgments of the grammaticality of Japanese double accusative sentences. *Language Sciences* (doi: 10.1016/j.langsci.2009.02.003)

Nakamura K. (2002). "-ni -ni" koobun no sonzai to yoo-hoo. *Journal of Humanities and Social Sciences, Okayama University*, 13, 83-99. (japane)

Nakamura K. (2003). "Zentai-bubun" kankei o arawasu nijuu o kaku koobun. *Journal of Humanities and Social Sciences, Okayama University*, 15, 163-173. (japane)

Radford A. (2004). *Minimalist syntax: Exploring the structure of English*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Schütze C.T. (1996). *The empirical base of language: Grammaticality judgments and linguistic methodology*. Chicago, IL: University of Chicago Press.

Thornton R. (1995). Referentiality and wh-movement in child English: Juvenile *D-linkency*. *Language Acquisition*, 4, 139-175.

Tomalin M. (2006). *Linguistics and the formal sciences: The origins of generative grammar*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Tomasello M. (1999). *The cultural origin of human cognition*. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton? – La komparacio de kvar cellingvoj por turkoj –

Gerald TUCKER

La turka lingvo havas komparacion tre simplan kaj regulan. La komparativo formiĝas per “*daha*”, la superlativo per “*en*”.

Simila sistemo ekzistas en la hindeŭropaj lingvoj de la studo, kvankam ne komplete konsekvence.

Ni pritraktos la komparacion en la hindeŭropaj lingvoj en la vicordo:

Esperanto
Hispana
Franca
Germana
Angla
Rusa.

La vicordon klarigos la sekvontaj priskriboj de la unuopaj sistemoj kun ties esceptoj kaj subsistemoj.

La komparacio en Esperanto

La komparacia sistemo de Esperanto bone kongruas kun tiu de la turka:

Formo	Turka	Esperanto
Baza	<i>Hakan büyük.</i>	Hakan (estas) granda.
komparativo	<i>Hakan daha büyük.</i>	Hakan (estas) pli granda.
superlativo	<i>Hakan en büyük.</i>	Hakan (estas) la plej granda.

Ambaŭ lingvoj produktas la komparacion analize, uzante senfleksian liberan morfemon. La vortoj *daha* kaj *pli* estas samsignifaj kaj samfunkciaj. Dum *en* estas samfunkcia, ĝi samtempe havas la sencon “larĝa/e”. La superlativo *plej* estas esence unufunkcia, ĉar ĝi estas intenca modifo de la sam-etima *pli*; uzate sen *la* ĝi tamen povas havi elativan sencon, preskaŭ sinonime kun “tre”, “ege” ktp.

Turko devas ankaŭ al kutimiĝi al la diferencoj inter sia lingvo kaj la unuopa cellingvo kiam temas pri la komparacia frazo. Vorton por la konjunkcio **ol** la turka ne havas. Ĝi uzas la ablativan sufikson **-dan/-den**. Krome la vortordo estas alia.

Hakan, Hasan'dan daha büyük = Hakan estas **pli** granda **ol** Hasan. Eĉ pli grandan diferencon turka lernanto malkovras ĉe la superlativo: *Hakan, ailenin en büyüğü* = Hasan estas **la plej** granda **de** la familio. En la turka bezoniĝas por esprimi la superlativon kombino de la genitivo kun la posesivoj, kaj intermeto de la superlativa partikulo. Esperanto kombinas laŭ la modelo de la latinidaj lingvoj la artikolon kun la superlativa partikulo kaj la genitiva partikulo. En la cellingvoj la vortordo kaj la morfologio strukture pli similas al tiu de Esperanto.

Por lerni la Esperantan komparacion bezoniĝas 5 morfemoj. (5 elementoj)

Fonto:

Kalocsay/Waringhien: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1980, §§ 69 – 73

Ni nun esploru, je kiu grado ĉi tiu sama problemo ĉe kiu cellingvo relative plej facile solviĝas laŭ la turka vidpunkto.

La hispana komparacio

La komparacio de la hispana baziĝas sur la partikulo **más**, kiu uziĝas en la komparativo kaj la superlativo:

Baza formo	Komparativo	Superlativo
<i>grande</i> = granda	<i>más grande</i> = pli granda	<i>el/la más grande</i> = la plej granda

Turke:

Baza formo	Komparativo	Superlativo
<i>büyük</i> = granda	<i>daha büyük</i> = pli granda	<i>en büyük</i> = la plej granda

La laŭsistema starigo de la adjektivo post la substantivon sekviĝas, ke la partikulo intermetiĝas:

Baza: *La isla bonita.* = La bela insulo.
 Komp.: *La isla más bonita.* = La pli bela insulo.

Superl.: *La isla es la más bonita* = La insulo estas **la plej** bela.

Komp.: *La isla es más bonita que la otra* = La insulo estas **pli** bela **ol** la alia.

Superl.: *La isla más bonita del mundo* = La **plej** bela insulo **de** la mondo.

Turke:

Baza: *güzel ada* = la bela insulo

Komp.: *daha güzel ada* = la pli bela insulo

Superl.: *ada en güzel* = la insulo estas (la) plej bela

Komp.: *ada diğer adadan daha güzeldir* = la insulo estas pli bela **ol** la alia insulo

Superl.: *dünya'nun en güzel adası* = la plej bela insulo de la mondo

Ĉi tie tre klare videbliĝas, ke turko devas al kutimiĝi ĉe kiu ajn hindeŭropa lingvo al tre fremda sistemo de komparado. En ĉi tiuj, kun la escepto de la rusa, la difina artikolo ludas tre gravan rolon. En la antaŭlasta frazo montriĝas, ke la turka en la komparativo laŭvorte esprimas: “La insulo estas **de** la alia insulo **pli** bela.” En la lasta la superlativa partikulo eĉ estas subtenata de la genitivo (**-nun**) kaj la posesivo (**-sı**).

Konstateblas, ke la hispana havas sufiĉe superrigardeblan komparacion, kompareblan kun la Esperanta kun la escepto, ke la en ambaŭ lingvoj uzata difina artikolo en la superlativo havas en la hispana kvar formojn (en Esperanto unu). Tipe por la hindeŭropaj lingvoj, la hispana tamen permesas al si vicon da trarompoj de la lingva sistemo: la t.n. neregulan komparacion. Kompreneble ĝi aperas ĉe tre ofte uzataj adjektivoj, kio por turklingvano estas pli-altigo de la nombro da lernendaj elementoj.

Feliĉe la nombro da tiaj adjektivoj estas relative malgranda, kio kompare kun la aliaj hindeŭropaj lingvoj de la studo donas al la hispana avantaĝon.

Baza formo	Komparativo	Superlativo
<i>bueno</i> = bona	<i>mejor</i> [me'hor] = pli bona	<i>el/la mejor</i> = la plej bona
<i>grande</i> = granda	<i>mayor</i> = pli granda	<i>el/la mayor</i> = la plej granda
<i>malo</i> = malbona	<i>peor</i> = pli malbona	<i>el/la peor</i> = la plej malbona
<i>pequeño</i> = malgranda	<i>menor</i> = pli malgranda	<i>el/la menor</i> = la plej malgranda

Menciinde estas, ke la formo *mayor* havas krome la signifon **pli aĝa**, kaj *menor* kromsignifas **pli juna**, ambaŭ kun responda signifo en la superlativo. En la senco de (dimensie) **pli granda / plej granda** aŭ la mala uziĝas la regulaj formoj *más grande* kaj *más pequeño*.

Por lerni la hispanan komparacion bezoniĝas 6 bazaj elementoj, 4 kontraŭ-sistemaj kaj 2 deviaj semantikaj elementoj. (12 elementoj)

En la turka kaj la celloj ekzistas ankaŭ la **elativo**, kiu estu aparte traktata.

Fonto:

Jackson/Rubio: Spanish Made Simple, Made Simple Books, Inc., New York, 1955.

La franca komparacio

Ekreginte la multajn formojn de la baza franca adjektivo, turko certe trovos la komparacion refreŝige simpla, kvankam la fenomeno de akordo kun la substantivo validas ankaŭ por la komparacio. La laŭsistema adjektivo formas sian komparativon per **plus** [ply]. La superlativo bezonas la saman elementon kun la difina artikolo. Kompreneble ne mankas ankaŭ en la franca la kontraŭsistemaj elementoj:

Baza formo	Komparativo	Superlativo
bon(ne) = bona	meilleur(e) [me'jör]= pli bona	le/la meilleur(e) = la plej bona
mauvais(e) = malbona	pire = pli malbona	le/la pire = la plej malbona
petit(e) = malgranda	moindre = pli malgranda	le/la moindre = la plej malgranda

La adjektivoj "*mauvais(e)*" [mo:'ve(z)] kaj "*petit(e)*" [pti(t)] ankaŭ povas esti komparaciataj laŭsisteme (regule). Kontraŭsisteme "*mauvais(e)*" havas la sencon de "mava", do esprimas kvalitan malbonecon, dum konkreta malboneco esprimiĝas per "*plus mauvais(e)*". Simile, "*plus petit(e)*" esprimas korpan malgrandecon dum "*moindre*" [müër] indikas malplian valorecon.

La konjunkcio por la laŭsistema franca komparativo estas "*que*" [kə] = **ol**.

Ekzemplo:

"*Ma robe est plus belle que la vôtre.*" = "Mia robo estas pli bela ol (la) via." Tamen la franca lingvo havas aron da latinidaj komparativoj, kiuj en la franca validas kiel propraj adjektivoj ankaŭ komparacieblaj. Sekvas listo da tiaj pruntaĵoj:

<i>antérieur</i> = antaŭa	<i>postérieur</i> = posta, malantaŭa, malfrua
<i>inférieur</i> = malplivalora,	suba <i>supérieur</i> = plivalora, supera
<i>intérieur</i> = interna	<i>extérieur</i> = ekstera
<i>citérieur</i> = ĉi-flanka, cisa	<i>ultérieur</i> = transflanka, aliflanka
<i>majeur</i> = plenaĝa, pli granda	<i>mineur</i> = malpli aĝa, pli malgranda

La supraj francaj adjektivoj el latinaj komparativoj havas kiel esprimilon de "ol" la prepozicion **à**, ekz.: *postérieur à* = pli malfrua **ol**. En vere adjektiva funkcio ili havas laŭsisteman komparativon: *plus supérieur que* = pli supera **ol**.

La superlativo

La laŭsistema franca superlativo estas tutsimple la komparativo kun la difina artikolo. "*L'Asie est le plus grand de tous les continents.*" = "Azio estas la plej granda el ĉiuj kontinentoj."

Kvankam tiu sistemo ne estas komplika, ĝi tamen devias de la turka esprimmaniero kaj ŝarĝas turkan lernanton, en kies lingvo la frazo estus "*Asya bütün kıtaların en büyüğüdür.*" Laŭvorte: "Azio de ĉiuj kontinentoj **sia plej** granda (estas)". Kompreneble turko havas ĉe ĉiu hindeŭropa lingvo similajn problemojn.

Kiel ĉe la komparativoj, la franca ŝanĝis kelke da latinaj superlativoj al pozitivaj (bazaj) adjektivoj komparacieblaj:

<i>extrême</i> = ekstrema	<i>intime</i> = intima, internega
<i>suprême</i> = (plej) sup(e)ra	<i>minime</i> = eta

La adjektivoj *ainé* [e:'ne] = "pli aĝa" kaj *cadet* [ka'de] = "plijuna" ne estas komparacieblaj.

Por lerni la francan komparacion bezoniĝas 6 bazaj elementoj, 3 kontraŭ-sistemaj kaj 2 deviaj semantikaj elementoj. Krome la franca uzas 14 latinidajn komparaciajn elementojn kiel pozitivajn adjektivojn kaj havas 2 nekomparacieblajn adjektivojn kun komparativa senco. (27 elementoj).

Fontoj:

Blanche: Französische Grammatik, Buch und Zeit Verlagsgesellschaft, Köln, 1967

Graff: Neue französische Grammatik, dnf-Verlag, Göppingen, 1997

La germana komparacio

La germana komparacio estas fundamente fleksia, konsistante el la komparativa finaĵo/infikso **-er-** kaj la konjugacio **als** (dialekte **wie**) kaj la superlativa **-(e)st-** kun la **genitivo** aŭ la prepozicio **von** = “de/el”.

Kiel predikatan formon la komparativo uzas nur la finaĵon **-er-**:

Germana	Turka	Esperanto
<i>Alina ist klein.</i>	<i>Alina küçük(tür).</i>	Alina estas malgranda.
<i>Mara ist kleiner.</i>	<i>Mara daha küçük(tür).</i>	Mara estas pli malgranda.

La atributa komparacio havas la samajn finaĵojn kiel la pozitiva adjektivo.

Germana	Turka	Esperanto
<i>der kleine Mann</i>	<i>küçük adam</i>	la malgranda viro
<i>der kleinere Mann</i>	<i>daha küçük adam</i>	la pli malgranda viro

Per tio la finaĵo **-er** fariĝas infikso **-er-**.

Depende de la lasta(j) litero(j) de la adjektiva stemo la infikso **-er-** perdas sian **e**:

teuer = multekosta
teurer = pli multekosta

Ĉe adjektivoj kiaj “*finster*” = “malgaja, obskura” povus okazi amasiĝo de senakcentaj **e**, tiel ke la unua forfalas:

ein finst(e)rerer Tag = malgaja tago
*ein finstrererer Tag** = pli malgaja tago

* por eviti “*ein finsterererer Tag*”.

Ĉe unusilabaj adjektivaj stemoj kaj tiuj kun finsilaba akcento finiĝanta per **-d**, **-s**, **-sch**, **-sk**, **-ß**, **-t**, **-x** aŭ **-z** enŝoviĝas antaŭ la **-st-** la vokalo **e** por plifaciligi la prononcadon:

berühmt “fama” > *berühmteste* *rasch* “rapida” > *rascheste*
bunt “bunta” > *bunteste* *sanft* “milda, softa” > *sanfteste*
dreist “impertinenta” > *dreisteste* *schwarz* “nigra” > *schwärzeste*
kraus “krispa” > *krauseste* *spitz* “pinta” > *spitzeste*
lax “neglekta” > *laxeste* *süß* “dolĉa” > *süßeste*
lieblos “sensenta” > *liebloseste* *wild* “sovaĝa” > *wildeste*

Por turkoj la “umlaŭto” (vokalmutacio – kp. la pluralon de substantivoj) estas kvazaŭ inversigo de la **vokalharmonio**. Dum la turka radiko / stemo influas siajn finaĵojn, la germana male havas la situacion, ke la finaĵo influas la radikan vokalon:

lingvo	Singularo	pluralo
turke	<i>ev</i>	<i>evler</i> └─┬─┘ └─┬─┘ └─┬─┘
germane	<i>Haus</i> [haʊs]	<i>Häuser</i> [ˈhøʏzər] └─┬─┘ └─┬─┘ └─┬─┘
Esperantlingve	domo	domoj
turke	<i>ayak</i>	<i>ayaklar</i> └─┬─┘ └─┬─┘ └─┬─┘
germane	<i>Fuß</i> [u:]	<i>Füße</i> [y:] └─┬─┘ └─┬─┘ └─┬─┘
Esperantlingve	piedo	piedoj

Simile estas ĉe la komparacio de unusilabaj germanaj adjektivoj en multaj okazoj. Ekzemploj de tiu subsistemo:

lingvo	Pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>büyük</i>	<i>daha büyük</i>	<i>en büyük</i>
germane	<i>groß</i>	<i>größer</i>	<i>größte</i>
Esperantlingve	granda	pli granda	plej granda
turke	<i>ihtiyar</i>	<i>daha ihtiyar</i>	<i>en ihtiyar</i>
germane	<i>alt</i>	<i>älter</i>	<i>älteste</i>
Esperantlingve	maljuna	pli maljuna	plej maljuna
turke	<i>soğu</i>	<i>daha soğu</i>	<i>en soğu</i>
germane	<i>kalt</i>	<i>kälter</i>	<i>kälteste</i>
Esperantlingve	malvarma	pli malvarma	plej malvarma

Kiam la finkonsonanto de la stemo estas **ch** (**ĥ**), la komparativo havas ĉe jena adjektivo krom la “umlaŭton” ankaŭ moligon de la **ĥ** > **j** (reprezentata per **h**):

lingvo	pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>yüksek</i>	<i>daha yüksek</i>	<i>en yüksek</i>
germane	<i>hoch</i>	<i>höher</i> [ˈhøʏər]	<i>höchste</i> [ˈhøʏstə]
Esperantlingve	alta	pli alta	plej alta

Ankaŭ en plua adjektivo estas simila devio, sed kun alidirekta ŝanĝo (h > ch):

lingvo	pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>yakın</i>	<i>daha yakın</i>	<i>en yakın</i>
germane	<i>nah(e)</i>	<i>näher</i>	<i>nächste</i>
Esperantlingve	proksima	pli proksima	plej proksima

Unu grupo da oftaj adjektivoj havas kontraŭsisteman komparacion:

lingvo	pozitivo	komparativo	superlativo
turke	<i>iyi</i>	<i>daha iyi</i>	<i>en iyi</i>
germane	<i>gut</i>	<i>besser</i>	<i>beste</i>
Esperantlingve	bona	pli bona	plej bona
turke	<i>az</i>	<i>daha az</i>	<i>en az</i>
germane	<i>gering</i>	<i>geringer/minder</i>	<i>geringste/mindeste</i>
Esperantlingve	malsignifa, -grava	pli malsignifa, -grava	plej signifa, -grava
turke	<i>çok</i>	<i>daha çok</i>	<i>en çok</i>
germane	<i>viel</i>	<i>mehr</i>	<i>meiste</i>
Esperantlingve	multa	pli multa	plej multa

Por lerni la germanan komparacion bezoniĝas 6 bazaj elementoj, 3 kontraŭ-sistemaj kaj 15 subsistemaj elementoj. Krome la germana uzas ĉe la atributa komparacio la samajn finaĵojn kiel ĉe la pozitivo kaj enŝovas aŭ elĵetas senakcentan e. (26 elementoj).

Post ekzameno de la komparacio de Esperanto, la hispana, la franca kaj la germana konstateblas jena provizora rangordo:

1. Esperanto
2. Hispana
3. Germana
4. Franca

Tiu rangordo respondas al la supre elektita vicordo kaj ricevos precizigon en la pritrakto de la angla kaj rusa komparacioj.

Fonto

Benzer: Eine kontrastive linguistische Darstellung der Adjektive in der türkischen und der deutschen Gegenwartssprache (disertacio), Universität Bochum, 2000.

(daŭrigota)

La urbo kiel vivomedio estas alloga – ankaŭ por vulpoj

Martin EBNER

Enkonduko

Sekuraj dormlokoj, partneroj por pariĝo, abunda manĝaĵo: en la urboj sovaĝbestoj trovas ĉion, kion ili bezonas. Sed la tiucela formigrado de vulpoj el la kamparo povas doni problemojn al ĝardenistoj kaj posedantoj de malgrandaj hejmbestoj. Aldone plialtiĝas la timo antaŭ la vulpa teniozo.

Estas facile nutri sin per forĵetitaj nutraĵrestaĵoj

Ĉu vulpoj siajn homurbajn loĝejojn ekipas en rustika stilo kaj post laborfina ripoztempo revas pri idilia vivo en la kamparo? Ĉu la felportantaj peltobestoj pli bone eltenas la urban aeron ol la homoj? Ĉiam pli da vulpoj loĝas diskrete en homaj setlejoj. Kelkaj el ili eĉ fartas tre bone meze de tondre muĝantaj trafikinsuloj.



Ruza vulpo: manĝi en homa urbo sandviĉrestaĵojn malantaŭ lunĉejo pli facilas ol kapti musojn en la kamparo

“Kvin vulpoj kaptis kvin obezajn kampmusojn grasajn“, tekstas antikva infan-langorompilo. Sed modernaj vulpoj preferas manĝi terpomfritojn kaj sandviĉrestaĵojn. Kial pene laboregi sur la monokulturoj de la kamparanoj, kiam aliflanke la rubaĵo el la rapid-